



NEDERLANDA ESPERANTISTO

*Monata Organo de la Nederlanda Esperanto-Asocio
"La Estonto Estas Nia"*

30-jara; n-ro 6-a. Administranto: P. M. Mabesoone, Cort van der Lindenlaan 42, Harderwijk. Jara abono por ne-membroj: gld. 4,50. Por membroj senpaga.

Redaktoro: H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem. Tel.: 0 83 00 - 2 66 99.

ALVOKO DE LA ESTRARO DE UEA AL LA ESPERANTISTARO.

Dum sia Printempa Kunsido, okazinta en la Domo de UEA en Rotterdam de la 20-a ĝis 22-a de aprilo, la Estraro de Universala Esperanto-Asocio pritraktis, inter multaj aliaj aktualaj demandoj, ankaŭ la membronombron de la Asocio, la financon, la agadon Afriko-Azio kaj la progresadon de la kampanjo okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

En ligo kun la diskuto pri tiuj punktoj ni decidis turni nin al la esperantistaro kun la sekvantaj petoj:

1. En 1964 UEA havis entute 32.202 membrojn, el kiuj nur 7154 estis individuaj membroj en diversaj kategorioj. Tio signifas, ke nur iom pli ol kvinono de la tuta membraro estis rekte internacie ligita pere de la publikaĵoj de la Asocio. Tiu nekontentiga rilato reflektiĝis ankaŭ je la financa situacio, ĉar la esencaj elspezoj por la multnombraj necesaj agadoj superis kaj plue superas la enspezojn. Principe ekzistis sole tri eblaj solvoj: aŭ malgrandigi la aktivecojn, aŭ altigi la kotizojn paralele kun la ĝenerala altiĝo de la vivkostoj, aŭ pligrandigi la nombron de la individuaj membroj. Fidante je la esperantista konscio ni unuanime akceptis la trian solvon. Ni do evoluigos ĉiujn ĝisnunajn agadojn, kvankam la kotizoj restos samaj, sed ni devas altigi la nombron de membroj je minimume mil pliaj individuaj
2. precipe en la kategorioj MA aŭ J-MA. Tial ni petas ĉiujn ĝisnunajn individuajn membrojn pagi tuj sian kotizon kaj varbi kiel eble plej multajn novajn MA. Ni plue petas ĉiujn esperantistojn, kiuj ankoraŭ ne estas individuaj membroj, aliĝi al UEA kiel membroj-abonantoj aŭ junaj membroj-abonantoj. Per tio la aliĝintoj ne nur rekte ligiĝos al la internacia movado, ĝuos ĉiujn avantaĝojn de individua membreco, sed ankaŭ helpos al la plua fortikigo de la monda organizaĵo, al ĝia multflanka utila laboro kaj al la solvo de la financa problemo.
2. Dank' al la agado Afriko-Azio Esperanto komencis disvastiĝi en pluraj landoj de tiuj du kontinentoj. Tamen, plej ofte, pro valutaj kaj aliaj malfacilaĵoj estas maleble pagi la kotizojn el diversaj evoluantaj landoj. Por solvi tiun problemon kaj helpi al la plua disvastiĝo de Esperanto en Azio kaj Afriko la Estraro decidis utiligi la Fondaĵon Prof. Canuto por pagi la kotizojn de membroj-abonantoj, junaj membroj-abonantoj aŭ membroj kun jarlibro por sindonaj esperantistoj unuavice en la evoluantaj landoj de la du kontinentoj, se la donacinto ne indikis eksplicite la personon, kiun li aŭ ŝi deziras membri. La estraranoj, la direktorino de la C.O. kaj la redaktoro de la revuo „Esperanto” tuj ko-

lektis mem inter si donacojn al la Fondaĵo por membrigi 17 MA, kaj 6 J-MA. La Estraro ankaŭ decidis transigi el la Propaganda Konto 5000 gld. al la Fondaĵo Canuto por la sama celo. Tio kune kun la antaŭe kolektitaj sumoj, ebligas la pagon de entute 291 kotizoj MA, 6 J-MA kaj 1 MJ. Ni apelacias al ĉiuj pli bonstatitaj esperantistoj, kiuj komprenas la gravecon de tiu paŝo por la plua disvastigo de Esperanto en Azio kaj Afriko abunde kontribui al la Fondaĵo-Canuto.

3. La kerna ero en la granda agado okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro estas la Propono prezentota al Unuiĝintaj Nacioj fine de la jaro 1965. UEA jam distribuis ĉ. 200.000 foliojn kun la teksto de la Propono. Ĝis la 22-a de aprilo envenis en la Centran Oficejon de UEA en Rotterdam pli ol 100.000 individuaj subskriboj kaj kolektivaj subskriboj de precize 411 organizaĵoj kun entute 5.638.000 membroj. La folioj ĝis nun venis nur el 43 landoj, kio signifas, ke el aliaj kvardek landoj, en kiuj UEA havas membrojn, ne alvenis eĉ unu foio.

Dankante al ĉiuj kiuj kontribuis al la ĝisnunaj rezultoj, la Estraro petas ĉiujn intensigi ĝis maksimumo la kampanjon por la kolektado de subskriboj kaj plenumi ankaŭ la aliajn erojn de la Laborplano por la Jaro de Internacia Kunlaboro. La Estraro ankaŭ petas regule sendadi la subskribitajn foliojn al la C.O. de UEA en Rotterdam, tiel ke ne amasiĝu tro da materialo en la finaj monatoj de la kampanjo.

Apenaŭ necesas atentigi, ke de la sukceso de tiu ĉi gravega nova agado multrilate dependas la pluaj paŝoj, kiuj UEA intencas entrepreni en tiu ĉi afero. Krome, la kolektado de la subskriboj donas unike taŭgan okazon por vasta objektiva informado pri la Internacia Lingvo, por instigado al lernado, varbado de novaj membroj kaj ĝenerale por fortikigo de la pozicio de la Internacia Lingvo en la mondo.

Ĉiujn kotizojn kaj donacojn por la Fondaĵo Prof. Canuto bonvolu sendi al la ĉefdelegito aŭ peranto de UEA en via lando aŭ rekte al la Centra Oficejo de

ASOCIAJ INFORMOJ.

NOVA ESTRARO.

Dum la jarkunveno de L.E.E.N., okazinta je la 2-a de majo en Amersfoort, ekŝiĝis kiel ĉefestraranoj s-ro H. M. Schippers, prezidanto, f-ino M. H. Vermaas, animo, kaj s-ro H. Groendijk, ano. Kiel novan prezidanton oni elektis s-ron H. Kervers, Hago. Kiel novajn membrojn oni elektis s-ron B. R. Beekhuysen, Delfzijl, kaj s-ron J. Calado, Rotterdam. La nova estraro de L.E.E.N. ekde la jarkunveno 1965 do estas:

Prezidanto:

S-ro H. Kervers, Van Slingelandtstraat 22, 's-Gravenhage.
Telefona: 070-542186.

(daŭrigo sur pĝ. 51)

UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, ĝirkonto 378964.

En la konvinko ke tiu ĉi alvoko havas vastan kaj efikan eĥon ni direktas al la tuta esperantistaro bondezirojn okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Ivo Lapenna, Prezidanto
Erik Carlén, Vic-prezidanto
E. L. M. Wensing, Vic-prezidanto
Günther Becker, Generala Sekretario
André Albault, Estrarano pri Kulturaj Aferoj
Maurice Jaumotte, Estrarano pri Landaj kaj Fakaj Asocioj
Józef Toczyski, Estrarano pri Lernejoj Aferoj
E. J. Woessink, Estrarano pri Financoj

Rotterdam, la 22-an de aprilo 1965.

U.E.A.-Kotizoj 1965.

Membro kun Jarlibro (MJ) pagas 10,— gld. kaj ricevas la Jarlibron. Membro-Abonanto (MA) pagas 20,— gld. kaj ricevas la Jarlibron kaj la revuon „Esperanto”.

Juna Membro-Abonanto pagas 15,— gld. kaj ricevas la Jarlibron, la monatan revuon „Esperanto”, kaj la kvaronjaran junularan gazeton „Kontakto”.

Peranto por U.E.A. en nia lando estas: Nederlanda Esperantista Asocio LEEN, pĝk. 34563, Rotterdam-25.

Sekretariino:

S-ino W. P. Lok-van Putten, Bredero-delaan 36, Santpoort Zuid.
Telefona: 02560-7615.

Kasistino:

F-ino P. Oosthoek, Bree 49 a, Rotterdam-25. Telefona: 010-197879.

Poŝtĝirkonto 34563 je la nomo de la asocio.

S-ro B. R. Beekhuysen, Noorsestraat 17, Delfzijl.

S-ro T. Boersma, Borniastraat 95, Leeuwarden.

S-ro J. Calado, Vergeet-mij-nietstraat 25 b, Rotterdam-12.

Telefona: 010-189481.

S-ro J. R. Janssen, Veen en Duin 15, Bloemendaal. Telefona: 02500-51120.

S-ro R. Slot, Ernst Casimirlaan 21, Zeist. Telefona: 03404-15228.

S-ino H. J. Woessink-Boet, Vondellaan 47, Arnhem. Telefona: 08300-21256.

ARBITRACIA TRIBUNALO.

En la jarkunveno 1965 elektigis kiel membroj de la arbitracia tribunalo (laŭ artikolo 47-a de la Interna Regularo de L.E.E.N.) jenaj personoj:

S-ro P. M. Mabesoone, Cort v.d. Lindenlaan 42, Harderwijk;

S-ino L. de Vries-Kanning, IJsselstraat 41 b, Groningen;

S-ro E. L. M. Wensing, Aalsterweg 217, Eindhoven.

Kiel anstataŭantojn la jarkunveno elektis: S-ron H. van Dalen, Sonneveldt 36, Amsterdam-Buitenveldert;

S-ron P. Korte, Prins Bernhardlaan 19, Veendam;

S-ron P. J. Roorda, Cattepoelseweg 99, Arnhem.

NACIA RESPOND-CENTRO.

Stariĝis antaŭ kelkaj monatoj nacia respondcentro en la kadro de F.E.N. La celo estas respondi al publikaj kritikoj kontraŭ Esperanto en ĵurnaloj, gazetoj, televido-kaj radio-elsendaĵoj.

D-ro G. F. Makkink, Eekhoornlaan 10, Bennekom, estas preta prizorgi ĉi tiun respondcentron. Bonvolu kiom eble plej baldaŭ post la aperigo de artikoloj respondindaj sendi ilin al s-ro Makkink.

Vi nepre menciu la nomon de la gazeto kaj la daton.

Anticipu dankon al ĉiuj kunlaborantoj.

EL LA SEKCIOJ.

Sekcio Arnhem.

Sekr.: Pontanuslaan 7.

Antaŭ unu jaro, membrino de nia sekcio, f-ino Van der Linden, vizitis Sud-Afrikon. Ŝi tie faris multajn belajn diapozitivojn kaj poste ŝi preparis sonbendon kun klarigoj pri ili.

Je la 26-a de aprilo ŝi montris al ni la bildojn kaj aŭdigis la klarigojn. Estis tre interesa vespero. Kvankam la lando havas multajn rilatojn kun la nia, ĝi ne estas tre konata inter ni. Post tiu ĉi vespero ni nun scias iom pli pri ĝi.

Ke la bildoj plaĉis al la ĉeestintoj, montriĝis per la fakto, ke la kunvenintoj petis dufojan montradon de multaj el ili. F-ino Van der Linden (adreso: Utrechtse weg 92, Heesum) estas preta viziti aliajn grupojn kun la bildoj kaj sonbendo.

Sekcio Den Helder „Nova Sento”.

Sekr.: Abel Tasmanstraat 2.

Ni organizis ekspozicion de esperantaj libroj kaj revuoj en la novkonstruita Publika Legejo dum la pasko-ferio. La nombro da vizitintoj ne estis granda, tamen ni faris kelkajn kontaktojn kaj kolektis subskribojn por la petskribo al UNO.

La 6-an de majo S-ro Janssen el Bloemendaal prelegis pri Primoŝten kun diapozitivaj en la hejmo de la sekretario por malgranda intima rondo. Kvankam malgrandnombraj, ni havis agrablan, instruatan vesperon.

Sekcio Groningen.

Sekr.: Johan de Wittstraat 103.

La 27-an de marto 9-persona delegacio de nia grupo, portante esperantan flagon, partoprenis la defilon por la ekŝiĝinta urbestro Tuin. Flanke de la aŭtoritatuloj, kiuj trovis sin sub baldakeno, ni ricevis fortan aplaudon! Ĉiu grupo estis anoncata per laŭtparolilo, tiel ke la nomo Esperanto sonigis super la publiko.

La 15-an de aprilo gesinj. Sleyser el Le Vesinet, Francujo, vizitis nian kunvenon. Krome ni havis aliajn gastojn, nome la ĉefestrarano s-ron Slot kaj lian edzinon. S-ro Sleyser rakontis pri sia ferio en Jugoslavujo kaj montris belajn filmojn. Kelkaj anoj de la kristana kaj F.L.E. grupoj ankaŭ ĉeestis la kunvenon.

La 22-an de aprilo okazis la finvespero

kun la lernintoj de la gazetkurso. 12 el ili ĉeestis la kunvenon, krome 19 el nia propra grupo. Per bonvenigaj vortoj, precipe al s-ro Baljet la prelegonto kaj la kursfinintoj, nia prezidanto malfermis la kunvenon. Plue li dankis s-ron Mook kaj s-inon De Vries pro la farita laboro kiel korektantoj de la gazetkurso.

Post tre vigla kantado, sub la lerta gvidado de fraŭl. Hovinga, s-ro Baljet el Leiden parolis pri sia vojaĝo al USONO kaj Kanado, montrante belegajn diapozitiv-ojn.

13 el la partoprenintoj de la gazetkurso daŭrigas la studadon de Esp. per buŝa kurso, gvidata de s-ino De Vries.

Sekcio Hago.

Sekr.: Van Trigstraat 20.

Dum nia pasinta klubvespero ni adiaŭis ges. Kervers kaj deziris al ili bonan vojaĝon al Pollando, kien ili estas invitataj de la pola esperantistaro. Kelkaj ĉeestantoj alportis ankoraŭ donacetojn, kiujn ges. Kervers kunportos al polaj gesamideanoj precipe al la rondeto de „Polaj Amikoj de Nederlando”, kiu fondiĝis en pola vilaĝo.

Por sia prelegovojaĝo ges. Kervers prunte ricevis multajn belajn diapozitivojn kaj eĉ kolorfilmojn kun sono, ne nur de la „Rijksvoorlichtingsdienst”, sed ankaŭ memfaritajn bildojn fare de LEEN-membroj. Krome s-ro Kervers prenis kompreneble la plej belajn el sia propra (belega!) stoko. Li parolos precipe pri la eterna batalo de Nederlando kontraŭ la akvo kaj ricevis por tia speciala temo multan materialon de „Waterstaat”.

Krome mi ne povas ne paroli pri la agrablaj horoj, kiujn ni post la paŭzo pasigis ludantaj. Ni elektis la jam konatan, sed de multaj eble forgesitan ludon, en kiu la ĉeestantoj divenu la profesion de la persono sur la podio. Por refreŝiĝi vian memoron: La „viktimo” sur la podio elektas iun ajn profesion (ni havis i.a. butikdektivo, porkovartistino kaj „ĉe-bebo-sidanto”) kaj demandas: „Kio estas mia profesio? Kaj jen, la kutime „ĉian muta aŭskultantaro” subite ŝanĝiĝas en viglan parolantaron, ĉar ili estas devigataj fari multajn demandojn por tiel eltrovi la profesion!

Por eksterurbaj gesamideanoj, kiuj ĉiam estas bonvenaj en nia rondo, mi informas ke ni dum junio ankoraŭ kunestos dum la merkredoj, la 2-a, 16-a kaj 30-a, vespere je la 8-a, Valkenboskade 520 (tram-

oj 3, 7, 12, 14). Poste ni libertempos ĝis la 8-a de septembro.

ESPERANTO KAJ LA METIA INSTRUADO.

Dum la jarkunveno de la „Nederlandse Bond van Leerkrachten bij het Nijverheidsonderwijs” (Nederlanda Ligo de Geinstruistoj ĉe la Metia Instruado) okazinta la 22-an kaj 23-an de aprilo en Groningen, estas pritraktitaj du proponoj kiuj ambaŭ celas esploron pri la ebleco kaj utilo de Esperanto por la metia instruado. La ĉefestraro, kiu antaŭ kelkaj monatoj decidis membriĝi al la „Fondaĵo Esperanto ĉe la Instruado” estis favora. Donace ĝi prezentis lokon por ekspozicio, krom tio ĝi donis la okazon al la Fondaĵo prelegi pri Esperanto antaŭ la pritrakto de la proponoj.

S-ro O. Hoekstra, reprezentanto de la ligo en la fondaĵo, faris la prelegon kaj klarigis la funkciajn formojn en Esperanto, pro kiuj ĝi estas pli praktika, pli baldaŭ lernebla kaj uzebla ol aliaj lingvoj. Li menciis diversajn eblecojn de internacia kontakto por la lernantoj kaj kiel estas eble doni ĝuon en la studado.

Poste du kontraŭuloj kritikis. Al ĉiu esperantisto tiuj kritikoj jam estas konataj, pri la kvantoj de esperantistoj kaj de angle parolantaj homoj, k.t.p.

La preleginto respondis kaj S-ro H. Behr el Groningen rakontis pri siaj spertoj kiel Esperanto-instruisto en la kvina kaj sesa klaso de la elementa lernejo, kiuj estis pli bonaj ol la spertoj kiel instruisto de la angla lingvo en la metia lernejo.

S-ro W. Dries, nome de la ĉefestraro diris, ke li komence ne estis entuziasma rekomendi la akcepton de la proponoj, sed aŭdinte la prelegon kaj diskutojn, al la kunveno forte volas rekomendi la akcepton de la proponoj.

La voĉdonado montris ke la proponoj estis akceptitaj per grandega plimulto.

Artmanifestacio en Zwolle.

Same kiel pasintjare denove okazos en Zwolle artmanifestacio „De Suikerberg” ĉe la antikva remparo Potgietersingel.

Okazos ekspozicio, demonstracio kaj vendado de artaĵoj de konataj artistoj, i.a. de pentristoj, skulptistoj kaj potfaristoj. La manifestacio okazos inter la 9-a de julio kaj la 7-a de aŭgusto, ĉiutage de 14-a ĝis 24-a h. Informoj ĉe la organiza komitato „De Suikerberg”, Emmawijk 8, ZWOLLE. Tel. 0 5200-15126.

NIA JUBILEA KONGRESO.

Ĉi sube vi trovas la tutan programon de la jubilea kongreso de nia asocio. Anoncu vin kiel eble plej baldaŭ, almenaŭ antaŭ la 1-a de aŭgusto, ĉar se partoprenos pli ol 70 personoj ni devos aranĝi pluan loĝejon kaj tio ne estos ebla en la lasta momento.

Se vi ankoraŭ bezonas pli da aliĝiloj petu al S-ino M. Doeve-van Wensveen Delftlaan 365 II, Haarlem aŭ al S-ro W. Rodenhuis, Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout.

Jubilea kongreso okaze de la 60-jara ekzistado de L.E.E.N., la 24-an ĝis la 26-a de septembro 1965 en „Internationale school voor Wijsbegeerte”, Dodeweg 8, Amersfoort.

Vendredon la 24-an de septembro 1965.

Proksime je la 19-a speciala aŭtobuso forveturos de la stacidomo de Amersfoort al la kongresejo. (Kostoj g. 0,50). La ĝusta tempo de la foriro dependas de la nova horaro de la fervojoj:

20.— Malfermo. Bonvenigo de la ĉeestantoj.

20.15 Festparolado de la prezidanto de L.E.E.N. S-ro H. Kervers.

21.— Paŭzo.

21.30 Distra vespero kun kantoj, komuna kantado, muziko, deklamado, k.t.p.

23.— Fermo de la kunveno.

Sabaton la 25-an de septembro 1965.

Matenmanĝo inter la 8.30 kaj la 9.30.

10.— Prelego de Prof. D-ro G. Hamming: „Ĉu la estonto estas nia?”

11.— Paŭzo kun kafo.

12.— Tagmanĝo.

11.30 Diskuto pri la prelego.

13.30 Ekskurso al „Hoge Veluwe. „Donaco de la unuiĝo al la kongresanoj.

14.30 Alveno kaj vizito al la muzeo, la domo aŭ la parko.

15.30 Kunveno en restoracio „De kopeeren Kop” kun regalo.

16.30 Foriro al Amersfoort.

17.30 Festmanĝo kun eblo gratuli la estraron.

20.— Arta vespero. Teatraĵo de Haga grupo - Kantado de Harlema kantgrupo - Deklamado de S-ro V. Sadler el „King Lear” de Shakespeare.

23.— Fino.

Dimanĉon, la 26-an de septembro 1965.

Matenmanĝo inter la 8.30 kaj la 9.30. Poste liberan antaŭtagmezon por iri preĝejon, viziti la urbon, promeni en la ĉirkaŭaĵo, ripozi, babili, k.t.p.

13.— Tagmanĝo.

14.— Prelego de S-ro Günther Becker, ĝenerala sekretario de U.E.A. pri „La graveco de la junulara movado por la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto”.

15.— Paŭzo kun teo.

15.30 Diskuto pri la prelego de S-ro Becker.

16.30 Fermo de la kongreso kaj poste foriro de la aŭtobuso al la stacidomo.

La Komitato.

50-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO.

OFICIALA KOMUNIKO.

N. 9. La 4-an de majo 1965.

Foto-konkurso. La personoj, kiuj ankoraŭ ne sendis la fotojn por la konkurso (vidu Of. Kom. no. 7), bonvolu tion fari per aerpoŝto (presaĵe) kaj ilin sendi al: 50-a Universala Kongreso de Esperanto, Hongo 2-2-14, Bunkyo-ku, Tokio, Japanujo.

Infana Kongreseto. Pro la nesufiĉa nombro da aliĝoj, LKK estas devigita rezigni je la okazigo de la 10-a Internacia Infana Kongreseto.

Aliĝo. Ĝis 4-5-1965 aliĝis entute 1430 personoj el 44 landoj.

Eksterurba Tago Sekcio Arnhem.

Sabaton, la 26-an de junio, la sekcio Arnhem organizos ekskurson al Doorn. Inter 2.30 h. kaj 3.30 h. oni vizitos la Kastelon Doorn. Poste la partoprenontoj kunvenos de 4-6 h. en Hotelo Pabst en Doorn. Interesiĝantoj estos kore bonvenaj.

Redakcio.

Pro ferio de la kompostisto kaj malsano de nia korektanto, s-ro S. S. de Jong, tiu ĉi numero de „N.E.” devis aperi kun iom da prokrasto.

SIMBOLA ALIĜO AL TOKIO!

Multaj esperantistoj, kiuj kutimas sufiĉe regule vizitadi la Universalajn Kongresojn, kiuj ne havas okazon partopreni la 50-an en Tokio, sed tamen plenkore aprobas ke fine okazu U.K. en Azio, interesiĝas pri ĝi kaj volonte subtenas ĝin. Aliflanke, tiu ĉi Kongreso, memkompreneble, kaŭzas multajn eksterordinarajn elspezojn, tiel ke malgraŭ la kontentiga aliĝado ĝia financa situacio estas ege malforta. Tial, kaj por doni al nepartoprenontoj la eblecon tamen ligi sin al la Kongreso, kaj por helpi al la financoj de tiu ĉi unika Kongreso, starigita estas

SIMBOLA ALIĜO AL LA 50-A

Tiu, kiu aliĝas simbole, pagas 25,— gld. (100 steloj), ricevos specialan kongresan karton kaj siatempe ricevos memoraĵon. Koncerne tion oni povas elekti: aŭ la Kongresan Libron, aŭ samvaloran artan japanan.

Aliĝante, oni tuj indiku kiun donacon oni elektas (en kunligo kun la presigota kvanto de la Kongresa Libro).

La kotizon de 25,— gld. aŭ egalvaloro oni sendu rekte al la Centra Oficejo de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, Nederlando, p.ĉ.k. 378964, bankrilato R. Mees & Zoonen, aŭ al la konataj adresoj de ĉefdelegitoj kaj perantoj.

18-a KONGRESO DE KRISTANA ESPERANTISTA LIGO INTERNACIA EN 1965.

La ĉijara internacia kongreso de K.E.L.I. okazos en BOLDERN (SVISLANDO), de la 24-a ĝis la 31-a de julio.

La kongrestemo estos: „La Evangelio - bona mesaĝo por la nuna vivo kaj por la venonta”.

Boldern situas en la proksimeco de la lago de Zürich, en tre bela naturo.

Okazos tri prelegoj pri la kongrestemo, kun postaj diskutoj. Ankaŭ estos distraj programoj kaj ekskursoj, inter kiuj unu tuttaga. La kotizo por partopreno de la kongreso kun plena pensio sumiĝas 125 aŭ 140 svisaj frankoj (depende de la ĉambroj).

Se vi volas aliĝi - skribu baldaŭ al:

S-ro Fritz Liechti
Wallisellenstrasse 429
8050 ZÜRICH Svislando.

TRA LA LIBRARO.

ISLANDAJ PRAVOĈOJ, tri rakontoj kaj unu poemo el antikva Islando. Tradukis Baldur Ragnarsson. Eldonis Eldona Societo Esperanto, Malmö. Formato 12½ x 19 cm., 110 paĝoj. Prezo f 6,75 bind., f 4,25 broŝ. Mendebila ĉe Libro-Servo L.E.E.N.

Se temas pri la antikva (bel)literaturo de la nordĝermanaj popoloj oni tuj pensas pri la *Edda*, nomo de kolekto da pridiĵaj kaj priheroaj kantoj de la praskandinavo, la t.n. pli aĝa *Edda*, aŭ pri la pli juna kolekto fare de la islandano Snorri Sturluson (dektria jarcento), enhavanta prozaĵojn kaj regulojn pri la poezia arto. El tiuj antikvaj verkaroj, sed ne estas tute klare el kiu, Baldur Ragnarsson ĉerpis kaj tradukis tri rakontojn kaj unu poemon el la islanda lingvo. Tiu lingvo estas la plej aĝa el la skandinava lingvoj kaj formas kontinuan tutecon ek de la antikva tempo. Tiel nesignifaj estas la ŝanĝiĝoj dum la jarcentoj ke nuntempaj islandaj gejunuloj povas facile legi la praaĵn tekstojn. La plej malnovaj rakontoj estas nomataj *saga*oj, islanda vorto por speco de legendo. En leginda enkonduko la tradukinto iom supraĵe priskribas la dividon de tiaj *saga*oj, el kiuj la „propraĵ” islandanaj estas la familiaj *saga*oj, de kiuj eĉ ne unu nomo de aŭtoro estas konata. En rilato kun la tiama kruda kaj simpla vivado sur insulo ne dorlotita de la naturo, la lingvo uzita estas senpretenda, la vortordo simila al tiu de la parollingvo, la frazoj mallongaj kaj lakonaj. Ragnarsson titolis la rakontojn jene: „*Hrafnel, la pastro de Frey*”, „*Torstein la Stango-ŝrapito*” kaj „*Audun kaj la urso*”. La du lastaj apartenas al la t.n. reĝ-sagaĵoj. Konsiderante la epokon en kiu ili ekestis oni konstato ke laŭenhave la prezento estas ĉarma kaj altnivela. La atento de la leganto estas tuj kaptita kaj streĉe oni legas ĝis la fino. Kompreneble la tiamaĵ moroj diferencis de la kutimaj nunaj: problemoj estis solvitaj tutsimple kaj eĉ, se necese, kun sangoverŝo. Sed la rakontoj klare reliefigas la iman vivadon de la praislandanoj, al kiuj ankaŭ nenio homeca estis fremda. Krome la verko enhavas tradukon de poemo antikva, 57 senrimaj strofoj, en kiu aŭguristino alparolas diojn kaj homojn, disvolvas la historion de la universo ek de la kreo de la mondo ĝis ĝia pereco kaj la elmariĝo de la nova tero.

Estas speco de epopeo kun forta morala subkurento, grandiozaj vizioj kaj akre konturitaj bildoj, sendube verkita de nekonaata pagana poeto influita de la Kristanismo. Ne ĉiam la bildigo estas klara kaj komprenebla, sed la tradukinto laŭpove en aldona notaro klopodas helpi la leganton.

Ne sciante la islandan lingvon mi ne povas juĝi pri la fidindeco de la traduko, kvankam la nomo de Ragnarsson (konata poeto kaj tradukanto en esperantujo) garantias sinceran verkadon. Certe li sukcesis kiom eble plej multe bone konservi la originalan simplan kaj senpretendan stilon, evitante neprajn neologismojn kaj tiel liverante al la esperantistaro tre elstaran kaj havindan libron. Estas rimarkinde ke lia transigo en la internacian lingvon estas jen en klasika esperanto jen tute moderna. Unuflanke li emas uzi senfleksie la numeralon *unu* en adjektiva senco aŭ la nekutiman artikolon *la* antaŭ adverba superlativo, apud aliflanke modernajn verbigojn kiel *volontas, pluis, interas*, ktp., kiel ekz. Schwartz kaj Rotkviĉ verkas. Miaopinie nekonsilinda estas la uzo de la difina artikolo antaŭ la vorto *ambaŭ*. Tamen ankaŭ brilas trafaj trovaĵoj en la tradukoj, de kiuj certe tiu de la poemo estis malfacila. Sed ĉu Ragnarsson ne estis nomita aŭtoro de la jaro 1964? Nobelego devigas!

Kaj al li kaj al la eldonejo ni danku pro plia riĉigo de la tradukita (bel)literaturo, tipografie bonege kaj plaĉbinde prezentita.

P. M.

„KANTANTE TRA POLLANDO”, de Roman Dobrzynski kaj Tadeusz Jarzecki. Eld. Pola Esperanto-Asocio, Varsovio. 1964. 55 pĝ. 17 x 12 cm., kun muziko. Prezo gld. 1,50 (6 st.).

Elektinte el kelkcent popolkantoj de Polujo, la aŭtoroj enmetis en la kantareton po kelkaj kantoj el ĉiuj pli grandaj regionoj de Polujo.

LETERO DE KVAKERO, de Alfred G. Tucker. Eld. Kvakera Esperantista Societo, p/a Arnold J. Leather, 67 Ridgeway Road, TIMPERLEY, Cheshire, Anglujo, 1965. 11½ x 18 cm., broŝ. Prezo: 6d aŭ 1 stelo.

Simpatia broŝuro pri la kredo kaj la praktiko de Kvakerismo.

La Ponto.

Se oni ŝatas legi verkojn el la mondliteraturo post la fino de la mondmilito, oni konas certe la faman libron de la jugoslava aŭtoro Ivo Andrić: „La ponto trans la Drina”. Precipe pro ĉi tiu libro la verkisto ricevis la Nobel-premion. Ĉi tiu produkto de la tekniko estis konstruata en la deksesaj jarcentoj, kiam la Turkoj deziris pli bonan kunligon inter Bosnio kaj Serbujo. Estas tre interese legi, kiel la lokaj popolgrupoj, la mahometanoj kaj la kristanoj, estis tre malfidaj je la nova projekto de la eksterlandaj potenculoj. Sed kiam la konstruado finiĝis, la ĝojo de la homoj estis tre granda.

Nun mi devas pensi pri Esperanto, kiu estas ankaŭ ponto inter la popoloj sur la tuta mondo. Sed ĝi ne estas tute preta ĝis la tempo, kiam ĉiuj mondloĝantoj povos diri: Nia laboro estas preta! Nun jam la beleco kaj la praktika utilo de la lingvo-kunligo estas klare videblaj!

En Hago okazis la kvardeknaŭa U.E.A.-kongreso dum la unua semajno de aŭgusto. La nunan jaron, en 1965, la ora kongreso estos en Tokio. Imagu, kiel granda estas la distancoj inter la du kongresurboj! La nombro-diferenco de la urbanoj estas pluraj milionoj! La malsameco inter la nederlanda kaj la japana lingvoj, la vizaĝoj, la agrikulturo, la brutbredado, la pejzaĝo estas tre tre grandaj! Kaj Esperanto formas la ponton inter la du kongresurboj, kiuj estas ĉeneroj en la ĉeno de Bulonjo apud maro, Genève, Cambridge kaj tiel plu. Nia mondlingvo restas la plej belega kaj praktika ponto, kiu kunligos la korojn de ĉiuj homoj en la tuta mondo!

Hilversum.

A. Put.

ESPERANTO-FAKO de UNIVERSITATA BIBLIOTEKO en Amsterdam.

Nun, kiam estas sisteme ordigataj la 3000 volumoj en la esperanta fako de la Universitata Biblioteko de Amsterdam, cele al oficiala eldono de detala, science kompilita katalogo, la Biblioteko speciale invitas donacojn de libroj kaj periodaĵoj, por ke la katalogo, kiam ĝi aperos, donu maksimume kompletan bildon pri la esperanta literaturo. Proponojn bv. direkti al: Esperanto-fako, Universitata Biblioteko, Singel 423, AMSTERDAM (C.).

KONCIZE

Daŭre ni ricevas ekzemplerojn de Esperantlingvaj faldfolioj por turistaj celoj:

BERLIN. Bele presita prospekto pri Berlino kun multaj kolorbildoj kaj granda mapo de la urbo. Oni petu ekz. ĉe: Verkehramt Berlin, Fasanenstrasse 7-8, 1 BERLIN 12, Germanujo.

PROVINCO LIEĜO (Belgujo). La Turisma Federacio de la Lieĝa Provinco eldonis en 1964 faldfolion en Esperanto. Tiu ĉi tre plaĉe prezentita faldfolio estas senpage akirebla ĉe **TURISMO FEDERACIO DE LA LIEĜA PROVINCO**, 33, Avenue Blonden, LIEGE, Belgujo.

La famaj gluplastoj, blankaj kun la surskribo „Esperanto“, kaj verda stelo, estas denove akireblaj kontraŭ la sama prezo kiel pasintjare, po du steloj (gld. 0,50) ĉe O. Hoekstra, Frederikslaan 47, SCHOORL.

Internacia Ligo de Esperantistaj Foto-, Kino- kaj Magnetofonamatoroj (ILEF) fondiĝis en 1957. En 1963 ĝi oficiale estis akceptita kiel Kunlaboranta Fakoj de U.E.A. Membro de I.L.E.F. povas iĝi ĉiu Esperantisto, kiu interesas sin pri unu aŭ pluraj de la fakoj fotografado, filmado kaj magnetofonuzado. Inf. haveblaj ĉe ILEF, Boks 36, SKÖVDE, Svedujo.

Agado kontraŭ la bruoj. Nederlanda instruisto Y. Lansen, Tweede Boerhaavestraat 40 huis, Amsterdam-O., organizas kampanjon kontraŭ la bruĝeno en kampadejoj, ofte kaŭzata de radioaparatoj, k.t.p. Li redaktis liston de 70 kampadejoj en Nederlando, Germanujo, Svisujo, Danujo, Italujo kaj Francujo, kie estas malpermesite fari tiaspecan bruon.

La dumonata **The International Language Review** (Revuo de Internaciaj Lingvoj) publikigas artikolojn pri internaciaj lingvoj. Raportisto por Esperanto estas John L. Lewine.

Aperas i.a. artikoloj en Esperanto. Adreso: Floyd Hardin, P.O. Box 393, DENVER 1, Colorado, U.S.A.

Raportisto por Nederlando: C. A. ten Seldam, Middenweg 117, Amsterdam-O.

ESPERANTA BILDVORTARO.

En la tuta mondo la bildvortaro de la germana lingvo estas konata („Der grosse Duden - Bildwörterbuch der deutschen Sprache“, 1958, eldonejo Bibliographi-

sches Institut, Mannheim).

Ĝi klarigas per 368 moderne desegnitaj bildtabuloj ĉirkaŭ 25 000 per bildoj klarigeblajn nociojn. Tiu fundamenta verko aperis ankaŭ en la angla, franca, hispana, itala, krome baldaŭ ĝi aperos en la portugala kaj sveda. Pro sia granda signifika la verko nun estos ankaŭ eldonata en Esperanto.

La eldono estas mendebla (prezo verŝajne 80 steloj) ĉe Esperanto Press, CARDIFF, Ontario, Kanado, kies estro Rüdiger Eichholz laboras pri la verko helpe de ĝis nun 170 kunlaborantoj. Por specialaj fakoj estas serĉataj pluaj kunlaborantoj, kiuj ricevos la parton de la verko koncentranitan ilin en bonaj presprovaĵoj senkoste.

Certa nombro da presprovaĵoj estas jam eldonita. Limigita kvanto de tiaj povas ankoraŭ esti abonata je la prezo de 50 steloj, kio rajtigas ricevi la definitivan verkon kun 50% da rabato.

(laŭ „Interlingvistika Informa Servo“, marto 1965).

ĈEĤOSLOVAKIO ELDONOS LA PLENAN VERKARON DE COMENIUS.

La Ĉeĥoslovaka Akademio de Sciencoj eldonos ĉijare la unuan el 43 volumoj de la plena verkaro de Comenius (1592-1670), kiun oni ĝenerale rigardas la fondinto de moderna edukado. La plena teksto de „Tirocinium“ kaj la unua kritika eldono de la „Amsterdamaj Dialogoj“, la plej grava teoria verko de Comenius pri edukado, aperos ambaŭ en la unuaj 13 volumoj, aperontaj antaŭ 1970. Estas konata la interesiĝo de Comenius ankaŭ pri la problemoj de komuna lingvo. (Laŭ „Unesco Features“ kaj Informa Servo de UEA).

Kun kiu mi povos kunveturi al **Helsingör** por partopreni al la feriaj kursoj en julio?

Mi estas mezaĝa, vigla sed kvieta kaj ne fumantino.

Bv. skribi al F-ino S. M. van Tatenhove, p/a Secr. Kuitstraat 32, Oosterbeek.

